

PROGRAMO DE LA IKUE-KONGRESO

Sabate, la 15-an de julio: alveno de la kongresanoj, disdono de dokumentoj, interkona vespero.

Dimanĉe, la 16-an, solena malfermo de kongreso, solena Meso en la Katedralo, festparolado de la Prezidanto pri la nuna krizo en la Eklezio.

Lunde, la 17-an, je la 9,30 h. Niaj rilatoj kaj niaj programoj kun KELI (prelegeto de s-ro H. A.de Hoog, eksprezidanto de KELI. Podiuma diskutado. Postagmeze vizito de la urbo Como.

Marde, la 18-an, Je la 9,30 h. prelego de s-ro Scherer (sekretario-kasisto de IKUE): « Ĉu IKUE ankoraŭ validas en E-movado? Se jes, ĉu ĝia vojo estas ĝusta? ». Sekvos diskutado. Posttagmeze: kunsido de la estraro por elekti novan sekretarion kaj por pritrakti eventualajn aferojn.

Merkrede, la 19-an Pri la interna vivo de IKUE,
La plenumkomitato,
La plialtigo de prezoj,
La plej taŭgaj formoj de nia propagando,
La kongresa urbo por 1973. La orienteŭropaj samideanoj proponas hungaran urbon por helpi la partoprenon de ĉiuj. Postagmeze vizito al Kard. Colombo en Milano.

Ĵaŭde, la 20-an: Tuttaga ekskurso per ŝipo.
Vespere orgenkoncerto en la katedralo.

Tiu programo povas eventuale iomete ŝanĝiĝi lastmomente, sed nur en nuancoj. Koran bonvenon!

La Prezidanto kaj la redaktoro

« Sac. Angelo Duranti, sekretario de I.A.B.O. (= Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj, kaj direktoro de Biblia Revuo, prelegos pri la temo: « Ĉu la releviĝo de Jesuo Kristo estas fundamento de nia kredo ».

EN LA BONA HORO

Antausentoj por la 34.a Kongreso de IKUE

Falas de la kalendaro
Folietoj for kaj for,
Flugas tagoj de la jaro,
Viglas penso tremas kor'.
 Proksimiĝas la momento
 De l' kongresa emoci'.
Antaŭiras penso, sento:
 Kiom kia estos ĝi?
Ĉu dum ĝi, dum la Kongreso
Falos la « obstina bar »?
Ĉu ĝin, kronos la sukceso
En la nun kuranta jar'?
 Iras penso, iras sento
 Kun la kor' pilgrimo tri,
 Al la homo, al prudento
 Ĉien kie regas ĝi.
Vagas ili tra la mondo
De palacoj ĝis kelar'
Penetrante kvazaŭ sondo
En animojn del homar'.
 Kaj jen vidas la pilgrima
 Kamarada tiu tri',
 Ke sur fundo homanima
 Ekmoviĝis la konsci'.

Timtremante vekigante
El ĉen' sin iras for,
Kaj sub vok, de l'ESPERANTO
Levas sin... en bona hor'.
 For malpaco ambicia,
 La konkordo estas jen
 La plej alta dogmo nia,
 La hereda nia ben'.
Por ni ĉiuj homaranoj
Unu sola estas cel'
Por ni ĉiuj pacamamoj
Unu verda brilas stel'.
 Estu « tridekkvara » la areno
 Por fratiĝa procesi'
 Kaj por ĉiu malkompreno
 Paciganto estu ĝi'...
Ĝis revido en Como
Plej grandare venu ni,
Kvinmil liroj la kotizo,
Post junio multe pli...

Originalo
F E Z

INFORMOJ PRI LA KONGRESO

La ĝisnunaj aliĝintoj estas:
Estraranoj de IKUE: F. Longoni, Italujo - A. Beckers, Belgujo - P. Scherer, Svislando - A. Berka, Ĉeĥoslovakio - M. Casanoves, Hispanujo - L. Kiš, Jugoslavio - N. W. Vigar, Anglujo - W. Mudrak, Aŭstrujo.
Redaktoro de EK: F. Ruaro, Italujo.
Pastroj: H. Paruzel, Pollando - P. K. Tic, Pollando - J. Christiaens, Belgujo - F. Stricki, Jugoslavio - A. Lantos Kiss, Hungarujo - Pietrzak S., Pollando - E. Violi, Italujo.
Prezidanto de UECI: A. Ciccanti, Italujo.
Redaktoro de Bibilia Revuo: A. Duranti, Italujo.
Aliaj ge-IKUE**-anoj:** C. C. Ferrari, Ita-

lujo - O. Parusel, Pollando - E. Thiollière, Francujo - R. Maudente, Italujo - S. Boschin, Italujo - R. J. Marmou, Francujo - A. B. Marinaro, Italujo - E. Bordogha, Italujo - F. Orlandini, Italujo - E. Vanneau, Francujo - L. Terrazzani, Italujo - Scherér, Svislando - M. Vári, Hungarujo - H. Oliván, Hispanujo - F. Galbusera, Italujo - P. Trevisan, Italujo - H. Gröbner, Aŭstrujo - N. Dell'Aringa, Italujo - S. Zaccché, Italujo - D. Boklak, Pollando - M. Boklak, Pollando - A. Beckers, Belgujo - V. Dall'Acqua, Italujo.
Prezidanto de FEI: G. Azzi, Italujo - M. Smyčka,opersolisto, Ĉeĥoslovakio.
Reprez. de KELI: H. A. de Hoog, Nederlando.

NIA SINTENO AL LA AŬTORITATOJ

Nia revuo nomiĝas Espero Katolika. Ĝi, do, devas por katolikoj kaj aliaj homoj de bona volo esti sana informilo pri Esperanto-movado kaj aliaj soci-kulturaj aferoj surbaze de moralaj principoj: bono kaj vero. Se iu volas ĝin fari tro kritikema kaj polemika, tiam ĝi pli aŭ malpli malproksimiĝas de sia tasko senco.

Mi nun aludas al iuj ideoj, kiuj troviĝas en la ĉijara E.K. sur la paĝoj 44-45. Certe ke ĉiuj, precipe kristanoj, devas « obei al Dio kaj Lia vorto, kiel ili parolas per nia konscienco ». Sed ĉu nia konscienco estas la plej supera juĝisto de la vero? Ĉu ni ne povas erari en niaj opinioj? Nia konscienco ne sekurigas al ni ĉiam la veron. Do, ni devas aŭdi ankaŭ iun alian, kiu havas kompetentan rilaton inter Dio kaj ni.

Dio havas sur la tero sian videblan anstataŭanton, kiu en doktrino kaj en moroj estas neeraripova, en aliaj aferoj li ankaŭ povas erari. Tio ne signifas, ke ni povas neobei al la voĉo de papo, ĉar lia agado ne konvenas al niaj opinioj. Ni ne devas blinde obei al li sed racie. Kiam li parolas al la mondo, li ne parolas kiel « ŝtatestro, politikisto, diplomato... » sed kiel anstataŭanto de Kristo, kiu diris al Petro: « Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo, kaj kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo, kaj kion ajn vi malligos sur la tero, tio estos malligita en la ĉielo » (Mt. 16: 19). Tiuj vortoj validas ankaŭ al ĉiuj legalaj posteuloj de apostolo Petro. Ni devas ne nur « aŭdi » sed ankaŭ « obei » al ekleziaj superuloj, kiam ni ne estas tute certaj, ke ili erare ion decidis. Ne apartenas al ni rigoroze serĉi, ĉu la papo estas en vero ĉu ne, ĉar liaj decidoj estas pli zorge pripensitaj ol ni opuloj povas tion fari. Ni ne metu niajn opiniojn antaŭ la vortoj aŭ ordonoj de niaj legalaj superuloj. Al ili estas dirite: « Kiu vin aŭskultas, tiu min aŭskultas; kiu vin malestimas, tiu min malestimas... » Lk. 10: 16).

Estas ankaŭ tiaj samideanoj, kiuj riproĉas al papo, kvazaŭ li ne klopodus helpi en materiaj kaj socialaj aferoj kaj malebligi malĝustaĵojn kaj aperigadon de malmoralaj revuoj ktp. La neeblo sukcesi en tiaj klopodoj ne signifas, ke la ekleziaj aŭtoritatuloj nenion faras. Se eklezio havas riton por benado de armilo, tio ankaŭ ne signifas, ke la Eklezio propagandas belojn aŭ intencas ekstermi popolajn, tribojn aŭ kontraŭulojn. Legu nur la enciklikojn de la lastaj papoj kaj la Aktojn de la Dua Vaticana koncilo. Opinio pri malbona intenco de ekleziaj instancoj ne estas kristana sinteno.

Ni estu pli humilaj kaj prijuĝu la farojn de aliaj en pli bona senco, tiel ni ne estos kontraŭ ili maljustaj.

P. Lovro Kiŝ

ANONCOJ

S-ano Karl Dürschmid komunikas, ke de la 22-a ĝis la 24-a de septembro okazos la « Trilanda Renkonto » de esperantistoj el Aŭstrujo, Italio kaj Jugoslavio, kaj la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Klagenfurt.

Provizora programo:

Vendredon, la 22-an de septembro: alveno de la partoprenontoj

16-a h. Kunsido de la AEF-estraranoj.

20-a h. Malfermo, salutado, informo pri la programo, interkona vespero.

Sabaton, la 23-an de septembro: Por la eksterlandanoj libera antaŭtagmezo ev. gvidado tra la urbo.

9-a h. AEF ĉefkunveno (por la aŭstroj)

13-a h. Tagmanĝo.

14-a h. Ekskurso en la ĉirkaŭaĵon de Klagenfurt.

19-a h. Reveno kaj vespermanĝo.

20-a h. Rezervita por eventualaj programeroj.

Dimanĉon, la 24-an de septembro:

8-a h. Katolika Diservo en Esperanto

10-a h. Trilanda festkunveno.

13-a h. Tagmanĝo kaj fermo de la aranĝo.

Kondiĉoj:

Kotizoj: A. Loĝado en hotelo: 395 Ŝil.

B. Loĝado en gastejo 290 Ŝil.

C. Loĝado en junulargastejo
(ĝis 25 j.) 150 Ŝil.

La aliĝilojn kaj la pagojn oni bonvolu sendi ĝis la 31-a de aŭgusto 1972 al jenaj adresoj:

Aliĝiloj: al s-ro Karl Dürschmid, A-9010 Klagenfurt, poŝtfako 205.

Pagoj: al Kärtner Sparkasse, Neuer Platz 14, A-9010 Klagenfurt ĝirokonto 0000-023 127 — por Esperanto — grupo Karintio.

Por certigi la plej favorajn kategoriojn estas konsilinde aliĝi kiel eble frue. Pluajn informojn volonte donas la aranĝantoj. Koran bonvenon!

Karl Dürschmid kaj Martin Stuppning.

S-ano Walter Mudrak aldonas: « AKLE (Aŭstria katolika ligo esperantista) estis fondita okaze de la Internacia Eŭkaristia Kongreso en Vieno, 1912. Laborante nun kiel faka grupo en Aŭstria Esperantista Federacio

(AEF) ĝi solenos modeste sian 60-jaran jubileon en kadro de la nunjara Esperanto Kongreso kaj Trilanda Renkonto en Klagenfurt. Estus ĝojige, se tiuokaze venus ne nur aŭstriaĵ, italaj kaj jugoslavaj esperantistoj, sed ankaŭ el aliaj landoj ».

* * *

Al la redaktoro ne sendu monon por la Esperanto-Kongreso, ne mendu ĉambrojn, ne sendu aliĝilojn, ne petu de li ekzemplerojn de Espero Katolika. Petu ekzemplerojn de la direktoro de la presejo de Chieri (TO), P. Ermanno Giannetto S.J. La ekzemplerojn de pasintaj jaroj vi povas peti de P. W. Flammer (Centra Oficejo en Zürchersmühle - Svislando). Anoncu la ŝanĝojn de adresoj ne al la redaktoro, sed al la jam nomita P. Ermanno Giannetto S.J. direkte.

Artikolojn sendu direkte al la redaktoro. Mi esperas, ke vi bone memoros tiujn ĉi anoncetojn.

Sac. Felice Ruaro

* * *

Dum la Kongreso de Como oni pritraktos problemojn de IKUE kaj EK. La legantoj estas invitataj sendi propojn al la estraro kaj al la redakcio. Vi scias, ke estas tre grave koni la dezirojn de multaj (ne nur de 15-20) IKUE-anoj.

* * *

Reinhard Haupenthal (D-6602 Dudweiler - Franz-Schubert-Str. 26) bezonas por la celoj de la Enciklopedio de Esperanto jenajn numerojn de EK: 1951: 406,408; 1952: 414. Krome li serĉas ĉiujn numerojn antaŭ la jaro 1947. Li estus dankema, se iuj legantoj povus helpi lian asocion.

* * *

S-ino Pauline Proulx (Québec - Kanada) mencias, ke la kotizo por EK en Kanado estas: 4 dolaroj.

* * *

Bonfaroj:

S-ro H. Gerling sendis 8 DM kiel donacon por nepagipovaj landoj.

S-ro H. Stahl sendis 8 DM por la biblia fonduso kaj 7 DM por EK-fonduso.

ANONCETOJ

La Esperanto-Grupo de Mannheim sciigas, ke la trafikoficejo de Mannheim eldonis faldfolion de la sama urbo. La faldfolio estas senpage havebla ĉe ESPERANTO, D - 68 Mannheim 1, T 6/18 - Germanujo. (T.e. la 18-a domo en la urbocentra kvartalo T 6: en la centro la stratoj ne havas nomojn).

* * *

Ankoraŭfoje oni sciigas, ke la nepagipovaj pastroj de orientaj landoj povas ricevi EK celebrante unu Meson je la intenco de la redaktoro. Ili bonvolu averti lin pri tio.

KVINPINSTELA PREĜO

Ni ĉiuj deziras pli bonan mondon: ĝi estos tia, se ĉiu pli zorgos pri perfektigo de si mem. Kiel tio estas atingebla? Per supremo de niaj malvirtoj, per plantado de virtoj. Ĉu tio estas facila? Ne ĉiam.

Sed ĉiu progreso en tiu laboro estas ĝojiga afero kaj kuraĝigas nin al plua klopado. Oni nur devas elekti konvenan metodon kaj persisti en komencita ekzerco. Mi memorigas kvin bazajn katolikajn verojn: donis al mi inspiron la kvinpinta katolika stelo.

Unua punkto: memoro pri la dia ĉeesto.

Mi pensas: Dio ekzistas, Li estas en la ĉielo, en senfina kosmo, en aero ĉirkaŭ ni, en mi mem. En Li mi estas, vivas kaj moviĝas. Li estas prezenta en miaj fratoj, proksimuloj, en ĉiuj homoj. Li estas en plantoj, ŝtonoj, en ĉiu viva kaj senviva materio. Mia Patro, mia Dio, estanta ĉiam kaj ĉie: mi Vin amas, laŭdas, honoras.

Dua punkto: ekzameno de si mem. Mi introspektas en mian konscion, mi memorigas al mi miajn pekojn kaj difektojn; mi pripensas kia mi estis rilate al Dio, al gefratoj, al mi mem; ĉu mi estis sincera, ĉu mi malhonoris mian homan dignecon? Dum kelka tempo mi konsideras mian konduton. Tria punkto: konvertiĝo al Dio per pentofarado.

Mi agnoskas la malbonon, kiun

mi trovis en mi, kondamnas ĝin, petas la pardonon de Dio. Mia kulpo, mia plej granda kulpo... Kompatu min, Sinjoro! Kristo, ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn de l' mondo, kompatu min! Kvara punkto: spirita Komunio kun Jesuo eŭaristia. Mi pensas, ke inter ni loĝas nia Sinjoro Jesuo en la plej sankta Sakramento. Li estas mia Dio, mia amiko, bonfaranto, mi ne povas forgesi Lin. Mi vizitas spirite Lin, loĝantan en la tabernaklo, salutas Lin, parolas kun Li. Mi deziras, ke Li venu en mian animon kaj neniam forlasu min.

Kvina punkto: preparo al bona, feliĉa morto.

La valoro kaj graveco de la preparo konsistas en tio: ke mi helpe de tiu akto povas trovi gracon en mia lasta horo kaj gajni la ĉielon; ĝi krome helpas nin vivi bone, evitante la pekon. Sanktaj verkistoj kiel S. Alfonso de Liguori insiste tiun praktikon rekomendas.

Mia morto estas certa, sed mi konas nek tempon, nek lokon, nek cirkonstancojn de la morto. Mi devas esti ĉiam preta, por ke mi povu inda eniri en la domon de la Patro. Mian morton mi akceptas kun fido de la mano de la plej bona patro kaj ĝi estos eterna unuiĝo kaj feliĉo kun Li. « En viajn manojn mi transdonas mian animon ».

Sac. Stefano Motyka (Pollando)

LEGANTOJ SKRIBAS

W. Mudrak (Aŭstrio)

Ĝoje mi legis, ke s-ano Walter Ludin, Svislando, same kiel mi, « akceptas tute la opinion de la artikolo de Otto Mauer (ne Maurer) ».

Volu permesi, ke mi ankoraŭ modeste menciu, ke mi do taksas min apartenanta al la legantoj, kiuj akceptas la opinion esprimitan en « LA KRIZO NEEVITEBLA » de Mons. Mauer (ne Maurer) tradukita de nia s-ano D-ro Adolf Halbedl. Mi pensas, ke la koncerna opinio estas konsiderinda kaj instiganta al pripensado kaj esplorado de nia konscienco, ĝuste en direkto laŭ « metanoia ». Certe ankaŭ alia opinio povas esti ebla. Mi aldone mencias, ke ambaŭ personoj, Mons. Mauer kaj D-ro Halbedl, estas multjaraj katolikoj, D-ro H. same fervora esperantisto, kiuj ankaŭ en la tempo de la persekuto, kiam Aŭstrio suferis sub nazista reĝimo, pruvis sian fidelecon al la Eklezio.

Certe oni povas malsamopinii, kaj ankaŭ tiam laŭ profunda kristana konsidero oni komprenu kaj respektu tion!

Mons. Mauer dum multaj jaroj ĝis nun animzorgas precipe la katolikajn akademiulojn kaj universitatojn en Vieno. « Kleine Zeitung-Graz », el kiu estas tradukita tiu traktaĵo de Mons. Mauer, estas unu el la malmultaj resp. verŝajne la sola efektive katolika tagĵurnalo en Aŭstrujo.

* * *

W. Mudrak:

Forte tuŝite mi vidis bildon de pastro Kolbe en EK aprilo 1972.

Volu permesi, ke mi jen citas pri tiu moderna martiro el « Rupertus-Blatt », la oficiala eklezia gazeto de la ĉefdiocezo Salzburg, de la 30.4.1972: mi tradukas el la germana lingvo: « Malkovri la bonajn elementojn » estas la titolo. « En la delonge elĉerpita libro de Maria Winowska pri M. Kolbe troviĝas citaĵo de li, kiu apenaŭ estas konata. Ĝi montras, ke tiu inteligenta pola franciskano ne apartenas simple en la rubriko « konservativa » aŭ ke envicigoj tiuspecaj estas tre nealireblaj. Ni devas — tiel diris Patro Kolbe — ekzakte studi la kontraŭreligiajn movadojn de nia tempo, iliajn metodojn kaj sukcesojn. Antaŭ ĉio ni precize diferencigu inter la bono kaj malbono en ili. En la batalo kontraŭ kondamninda movado necesas unuavice trovi ĝiajn bonajn elementojn, elŝeligi kaj alproprigi ilin. La preterlasoj tiurilate en Meksiko kaj en Hispanujo kondukis al detruigaj sekvoj ».

La redakcio dankas la senlakan s-anon W. Mudrak, kiu donas tiel fervoran

kontribuon al nia revuo. Ni volus havi multajn samideanojn kun simila agemo kaj sindoneco. Mudrak transdonas la esprimon de danko de ĉefepiskopo D-ro Eduard Macheiner al la IKUE-anoj, kiuj sendis al li siajn salutojn okaze de la Londona Kongreso.

* * *

Roland Jossinet (Francujo):

Dum la internacia E.-Kongreso en Antwerpen, fine de Aprilo, « oni » organizis Diservon laŭ la « ekumenisma spirito »: faris meson du pastroj kaj predikis pastorino.

Mi intence ne partoprenis tiun ceremonion. Mi ĉeestis paroĥan meson, kies nur gestojn mi komprenis.

Efektive, mi opinias, ke ekumenismo estas necesa aldono al katolikismo, sed ĝi restas nur aldono.

Mi rifuzas juĝi la organizintojn kaj la partoprenintojn. Certe iliaj intencoj estis tre bonaj.

Sed mi ne konsentas favori difektadon de mia religio, eĉ sub la preteksto de Esperanto.

* * *

Sac. Nowakolski al D-ro Halbedl:

Se mi ne estus teologo, mi silentus, sed mi estas, supozeble samnivele kiel la prelato Mauer, laboranta en la Eklezio kaj per eklezia vivo vivanta. Mi tre bedaŭras, ke mi devas esti ĉi-afere sincera, sed: la opinio de la prelato ŝajnas esti neobjektiva, nescienca, malprava (almenaŭ grandparte), malsana. Evidente ne estas ĉi tie loko por diskutado — kio cetere ne estas ja simpla. Mi samideane salutas vin, restante al vi danko pro viaj grandaj netakseblaj meritoj en la E-movado.

* * *

Brans:

Mi esprimas mian konsenton pri viaj respondoj en la marta numero. La revuo staras nun sur la bona vojo kaj mi esperas, ke ĝi prospere marŝos. Kelkfoje, precipe en tradukoj, la lingvo ne estas sufiĉe klara kaj simpla. Elsendoj el Radio Vatikano estus tre dezirindaj.

* * *

D-ro Roose, ano de la « Belga Esperanto Federacio » skribis al la Prezidanto, ke en Romo sur la placo antaŭ la baziliko de S. Petro li aŭdis la Papon salutantan en multa lingvoj, sed bedaŭrinde ne esperantilingve. « Nun mia demando al vi kiel al la prezidanto de IKUE: ĉu iam la estraro

de IKUE montris al la estraro de nia katolika eklezio la mallogikon de tiu situacio? ĉu ĝi iam demandis, ke Esperanto estu ankaŭ uzata en tiaj cirkonstancoj? ».

Respondo de la redaktoro. La Prezidanto respondis private al tiu ĉi letero. Estas bone memori, ke la Prezidanto interisiĝis pasintjare pri la dissendo de katolikaj sciigoj pere de la Vatikana Radio skibante persone al la Papo, kiun li konas ek de la tempo kiam Paŭlo VI estis episkopo de Milano. La letero estis transdonita al la kompetentaj oficejoj de Radio Vatikano, kiuj respondis, ke pro teknikaj motivoj nun ne estas eble dissendi en Esperanto. Oni devas memori, ke ankaŭ Patro Jacobitti parolis tiucele kun la Papo kaj ke multaj samideanoj sendis petojn al la estraro de Radio Vatikano antaŭ malmultaj jaroj. Ni ripetos niajn demandojn. Ni esperas ke post malmultaj jaroj ni aŭdos la salutojn de la Papo ankaŭ esperantlingve kaj dissendojn de la Vatikana Radio por la esperantistoj de la vasta mondo.

« L'espero, l'obstino kaj la pacienco jen estas la signoj, per kies potenco ni paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro » (Zamenhof).

* * *

H. S. Corlett (USA):

Unue mi volas danki al vi ĉar Espero Katolika nun estas tre kontentiga revuo. Tiun ĉi jaron ni perdis multe da membroj, kaj — laŭ mia opinio — la problemo estis la iom molkontentiga revuo de la pasinta jaro. Espreble la situacio en nia lando pliboniĝos.

Mi deziras al vi sukceson en via nefacila tasko...

* * *

D-ro Rudolf Preclík (Ĉeĥoslovakio):

Mi eksciis el la informilo de ĈEA ke vi estas redaktoro de la famkonata revuo EK: mi gratulas vin. Domaĝe, ke ni ankoraŭ ne povas aboni vian revuon pro devizaj malfacilaĵoj. Mi posedas kelkajn malnovajn jarkolektojn, kiujn mi ricevis kiel donacon el Nederlando.

* * *

Al s-ro Peter van Bentum poŝtkesto 6781, HAGO Nederlando

Mi kore dankas pro via respondo al mia letero adresita al s-ano prezidanto de IKUE. Ĉar vi alvokas min kontraŭrespondi, mi plenumas vian deziron. Sendube ĉiu via frazo postulus pli longan analizon, sed mi devas limigi min al solvo de kelkaj ĉefaj problemoj.

Antaŭe — mi senrezerve konsentas kun vi ke moralo estas *totala*. Tian mi

komprenis ĝin eĉ en mia lasta letero. Ĝuste pro tio mi kunligas seksan moralon de unuopulo kun maljusteco en la mondo. Ĉu ekzemple ne parolas sufiĉe elokvente skrua fakto ke dum 14-taga milito en Bangladeŝio seks-misuzis soldatoj de Okcident-Pakistana armeo 200 000 /!/ virinoj? Ni devus esti blindaj, se ni plue ne vidus familiajn disfalojn pro moralaj kaŭzoj kaj malfeliĉajn infanojn, kiuj devas suferi pro nerespondeco de siaj gepatroj. Estas ja konate ke homoj vivantaj « tute libere » neagnoskante kiajn ajn moralajn obstaklojn fariĝas ĝenerale egoistoj, kiuj aŭ tute ne interesiĝas pri problemoj de aliaj homoj, aŭ senrespekte celas al siaj personaj interesoj. Ĉu oni povas atendi de tiaj individuoj oferecon kaj justecon sur la kampo socia?

Laŭ mia opinio historio de la homaro sufiĉe bone pruvas seriozecon de menciitaj aferoj. Ĉu ne detruigis jam multaj famaj socioj ĝuste pro nemorala vivo de iliaj anoj? Ni estas ja atestantoj de la situacio, kiam logike kun falado de la moralo de unuopulo ligilon inter privata memŝateco kaj maljusteco en la mondo, kiun mi konsideris en mia pasinta letero. *Homa familio estas do tia, kiaj estas ĝiaj anoj.*

Se vi impresis ke mi tro akcentas ĉastecon de individuoj kaj ne rilatojn inter popoloj, do tio estus nur ŝajno, ĉar mi skribis leteron kaj ne ampleksan traktaĵon pri moralo. Tamen mi miris al kelkaj frazoj de via respondo. Vi enkondukis via leteron per vortoj: « Kun multaj aliuloj mi forte kontraŭstaros aŭtoritatojn... kiuj per cenzuro kaj/aŭ per aliaj aranĝoj kaj disponoj atakos la pornografion ». Ĉu vi vere volas tiel serioze protekti unu nemoralon, se vi sur alia flanko juste kaj kun miaj simpatioj atakas grandajn nemoralojn en la nuna mondo?

Vi mem analizas kontaktojn de unuopaj partoj de la moralo sur alia loko kaj ĝuste akcentas totalecon de ĝi. Tial do devas validi viaj propraj vortoj ankaŭ en mala formo:

« Oni ne rajtas laŭ bezono aŭ la bontrovo emfazi nur parton, ekzemple tiun, kiu rilatas pacon kaj militon, justecon kaj maljustecon — komprenu en vastaj sociaj formoj! — kaj samtempe neglekti aliajn partojn, ekzemple la seksan — ligante ĝin memkompreneble al gepatra respondeco kaj aliaj devoj de individuoj ».

Mi ne povas konsenti ankaŭ kun via aserto ke la senco kaj intenco de « ĉasteco » en la nuna mondo tute mankas, ĉar principaj leĝoj de homa vivo estas ĉiam la samaj kaj ne validas nur por iu epoko. Se vi ne vidas danĝeron por junularo en pornografio, do mi estas konvinkita pri kontraŭo, ĉar ekzistas objektivaj spertoj, kiuj ne estas tro konsolaj — precipe el tiuj landoj, kie oni tute libere disvastigas tiujn filiteraturon kaj figazetaron. Ĉu ne konvinkas vin ekzemple situacio en Svedio rilate al veneraj malsanoj de lerneja infanaro aŭ rapide kreskanta kriminaleco de junularo en multaj okcidentaj landoj?

Fine mi volas aldoni ankoraŭ kelkajn pensojn. Rigardo de kristanoj al

tuŝita problemaro estas kompreneble alia ol tiu de individuoj nerekonantaj valorojn ekster homa natureco, sed tio ne rajtas malhelpi dialogon. Depende mi rememorigas vian noton ke ankaŭ inter intimuloj de Jesuo Kristo troviĝis publikulino. Jes, vi pravas. Li venis ĝuste por savi pekantojn kaj tial vi povus ekscii el biblio ke ĉiuj homoj ĉirkau Li estis pekintoj. Sed Li venis kaj mortis ankaŭ pro ni, homoj de 20-a jarcento — pro mi, pro vi eĉ pro ĉiuj aliaj. Ĉu nunaj kristanoj povas tion neglekti kaj lasi malbonon libere furiozi?

Peno de ĉiu honesta homo devas esti — trovi veron kaj bonon. Kaj mi volas kredi ke ankaŭ vi sopiras entute pri pli bonaj rilatoj inter homoj kaj pri pli granda justeco en la mondo, ĉar vi tiom akcentas ilin.

Ankaŭ mi salutas tutkore vin kaj vian edzinon — eble vi ne havas infanojn — de mia tuta familio inkluzive de infanoj, kies estontecon preparas *nia* generacio

Jan Kalny

Adreso: J. K. Prazská 77 Znojmo

EL LA LANDAJ ASOCIOJ

Esperanto-Diservo dum Internacia Kongreso en Antverpeno

En la kadro de la Internacia E.-ongreso en Antverpeno okazis, dimanĉon, la 30-an de aprilo 1972, diservo en ekumena spirito en la preĝejo de Sankta Karolo Boromeo.

La Sanktan Eŭkaristian Diservon ĉeestis pli ol 300 Esperantistoj kaj estis koncelebrata tute en Esperanton de pastroj Beckers kaj Saen el Belgujo kaj de patro Bourdon el Francujo. La preĝoj estis kune recitataj de la ĉeestantoj.

La predikon prizorgis pastorino J. Koopmans el Nederlando, kiu elektis temon el la profeto Isaio, en kiu ŝi pritraktis la soifon al Vero kaj la amon al la proksimulo en la dia persono de Kristo.

Dum la Meso Myriam Van Hove, iuna talentplena kantistino, aŭdigis diversajn religiajn kantojn en pluraj lingvoj kaj tiamaniere akcentis la internaciecon de la Ekumena Diservon.

Por multaj antverpenanoj estis la unua S. Meso en Esperanto, kiun ili ĉeestis.

E. P.

LA LUDO DE LA MORTO

Alproksimiĝas somero, do sezono en kiu multaj homoj pere de diversaj veturiloj (speciale per mekanikaj veturiloj: aŭtomobiloj, motocikloj, motocikloj kun kromĉaro kaj aliaj motoriziloj) forveturos de malsilentaj niaj urboj kaj urbetoj por pasigi la libertempon en belaj vilaĝoj, silentaj kuraĉlokoj kaj multaj ripozejoj, post tutjara laboro — unuvorte ĉiu el ni serĉos lokon de soleco, de vera kontakto kun naturo, freŝa aero, de renkontiĝo kun Dio.

Ĉio-ĉi estas al ni necesa, ĉar niaj korpo kaj animo estas tro lacaj pro « bonaĵoj », kiuj alportas al ni la civilizacio de nuntempo. Sed ĉiu el ni devas memori, ke ĉi-tiu civilizacio kiu estas unuflanke tre utila kaj bezona al ni, duflanke bedaŭrinde alportas al ni multajn danĝerojn, pri kiuj ni ne povas forgesi. Mi pensas pri la rikolto de la morto sur niaj ŝoseoj aŭ en aliaj cirkonstancoj en kiuj nur nia prudento, atento kaj saĝo permesos al ni eviti ofte tragediajn situaciojn — bedaŭrinde tiel dolorajn kaj tiel terurajn.

Trobraveca veturigado, drinkaĵoj kaj nesubordigita al veturpreskribaĵoj konduto de kondukistoj e-

stas kaŭzo de multaj tragediaj akcidentoj.

Mortas homoj, suferas homoj kaj eĉ infanoj, multnombraj fariĝos invalidoj. Plenplenigitaj estas malsanulejoj, klinikoj.

Kardinalo Colombo el Mediolano (Milano) en sia tre saĝa artikolo, kiu aperis en « Osservatore Romano » konstatas, ke katolikoj devas konfesi pro pekoj kontraŭ danĝera veturigado sur la ŝoseoj. Kardinalo kontinuas, ke oni devas unue tre bone ekkoni la veturpreskribaĵojn kaj poste decidiĝi pri la veturigado.

Kardinalo Colombo skribas, « Trobraveca veturigado kaj ĉia malatenteco sur la ŝoseoj estas peko — eĉ, se ili senpere ne estas kaŭzoj de malfeliĉaj akcidentoj ».

Do se ni decidiĝas pri la direktado de la mekanika veturilo ni devas: unue — prepari veturilon al veturado; due — prepari nin mem al direktado; kaj trie — peti Dion, ke Li gardu nin de la tragediaj akcidentoj. Ĉar ni ne havas rajton mortigi nin mem kaj niajn proksimulojn.

*Sac. Dr. Zbigniew Kucewicz
Pollando*

ANONCETO

Eduard Fangli, 21 jara teologiestudento skribas:

« Mi bezonas religiajn librojn (katolikajn), unuavice teologiajn librojn. La bonfarantaj fratoj povas sendi germane, latine, esperante, itale, hungare, rumane kaj france skribitajn librojn. La rekompenco estas: mi bonvenigos kaj gastigos la bonfarantajn samideanojn kaj ekzercos esperantlingvan koversacion. En tiu espero mi antaŭdankas vin ».

INTEREKLEZIA REKONO DE LA BAPTO

La respondeculoj de la katolika kaj de kvar evangeliaj Ekleziaj en Belgujo subskribis la 23an de la pasinta novembro en Brukselo, intereklezian rekonan deklaron pri la Bapto.

Ĉi tiu dokumento montras la decidigan etapon de nombraj renkontoj.

La subskribintoj opinias, ke tiu deklaro reprezentas la komencon de aŭtentika, ekumena dialogo ĉar manifesti ke ĉiuj baptitoj estas kuniĝitaj en la sama Dio en unu sola Korpo, fakte signifas inviti ĉiujn Ekleziojn daŭrigi la teologian pripenson pri ĉio, kiu kunligas kaj dividas.

La teologia komisiono redaktinta la dokumenton intencis aparte reliefi la eklezian aspekton de la

reciproka rekono. Fakte rekoni la Bapton signifas multe pli ol simple konstati la validecon de individua Bapto, sed antaŭ ĉio signifas rekoni la Eklezian komunon en kiu la Bapto okazas kaj la ministerian oficon de la administranto.

La reciproka rekono de la Bapto « rajte administrata de diservisto rekonata de ĉiu Eklezio » naskas kelkajn porpastrajn konsekvencojn. Tuj de la komenco necesas sentokapabligi ĉiujn komunojn pri la centra graveco de la Bapto kiel eklezia evento. Do, la familio kaj la komuno estas ja respondeigitaj fronte al la infano. Plie, oni devas ankaŭ atendi, antaŭ la Bapto, ke la gepatroj estu pretaj akcepti, konscie, la ŝargon de tiu respondeco.

AGADO DE SEKCIO DE KATOLIKAJ — IKUE — ESPERANTISTOJ ĈE ĈEA

Komitata kunveno de la Sekcio kunsidis en urbo Prerov sabate la 8-an de aprilo 1972. Oni konstatis ke la laboroj de la sekcio disvolviĝas laŭ akceptita laborplano. Okaze de la kongreso de ĈEA en Ostrava: 6 - 9. V. 1972 nia Sekcio aranĝos sian fakan kunvenon lunde la 8-an de majo. Posttagmeze la saman tagon celebros nia membro sacerdoto Alois Eineigel sanktan meson en Esperanto por la anoj de nia sekcio kaj alvenontaj gastoj — ĝi okazos en lia preĝejo en Havírov-Suchá — ni grupe alvenos de Ostrava — 20 Km. — Ni esperas ke, precipe niaj polaj samkredanoj partoprenos.

En tagoj 10 - 11-a de junio nia Sekcio kunvokas renkontiĝon de siaj anoj en sudbohemian urbon České Budějovice kaj Bošilec kie nia membro sacerdoto Josef Xaver Kobza celebros por ni sanktan meson en Esperanto. Vespere okazos komitata kunveno de la Sekcio. Ni aranĝas ĉi renkontiĝon en suda Bohemio, ke ni ebligu la partoprenon al niaj membroj loĝantaj dise en tiu ĉi parto de la respubliko.

Kongreson de Slovakaj esperantistoj partoprenos la prezidanto A. Berka, kaj tie renkontiĝos kun niaj membroj el Pollando kaj Hungarujo kiuj al la ongreso alvenos — Sac. Zielonka kaj aliaj.

Somera Esperanto-tendaro en Herbortice estas preparata fare de niaj membroj Šváček, Mlejnek, Severin kaj aliaj kaj la ĝisnuna intereso donas epseron, ke ĝi denove estos plene sukcesa.

Aŭtune ni planas renkontiĝon de unaj sekcianoj en pilgrimloko Hory ĉe Česká Třebová — 10.X.1972.

La IKUE kongreso en COMO. Bedaŭrinde verŝajne neniu povos partopreni el nia lando. Estas malfacile ricevi elirpermeson kaj necesan monon. Por venonta jaro ni petas la estraron de IKUE esplori eblecon okazigi Komunan kongreson IKUE-KELI en Budapesto aŭ iu alia lando de Hungarujo, ĉar en tiun landon ni povos veni en pli granda nombro — eble 50 personoj! same ankaŭ niaj membroj en Pollando, kaj ceteraj socialismaj landoj, kaj se ni konsideros eblecon veni de la okcidentaj landoj, ni povus fari nian kongreson impona manifestacio. Krome IKUE kaj KELI havas en Hungarujo sufiĉe da membroj — kvankam dise loĝantaj — sed mi estas certa ke en Budapest ni trovos sufiĉe da kapabla esperantistoj — kiuj bone la kongreson preparus.

Ni proponas Hungarujon anstataŭ Jugoslavio, ĉar ni al Juvoslavio ne povos veni same kiel en okcidentajn landojn — tia estas situacio, do bonvolu prijuĝi nian proponon kaj nin informu.

Denove ni petas publikiku en E.K. Alvokon pri la ebleco mendi diversajn E-librojn kaj aĵojn ĉe mi — pagante ĉion al la IKUE Kaso, por tiel helpi la finacojn de E.K. kaj IKUE. Ĝis nun la rezulto estis preskaŭ nula.

Ni intencas disvolvi kontaktojn kun IKUE-anoj en socialismaj landoj kaj helpadi unu al la alia.

Finante ĉi komunan leteron, mi petas ricevi de vi ĉiuj aparte respondojn ĉar tio helpos al mi en nia izoliteco.

Elkore mi salutas vin ĉiujn en nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo!

*Via sindona: Aleš Berka,
prezidanto de la Sekcio*

SONORILOJ...

Sonoriloj! Via sono
estu voko al la bono
kaj porpaca jen admono!

Via inda melodio
sonas je la glor' de Dio
kaj por homa harmonio!

Tial, kiu vin forprenas,
aŭ misuzon entreprenas,
mem sin juĝas kaj malbenas!

Sonorila kant' bonvena,
sonu, pacproklam' solena
tra la tempo sortoplena!

Walter Mudrak, Wien

Ĉiuokaze estas interesa kaj notinda sentenco, troviĝanta sur sonorilo de preĝejo en urbeto de Malsupra Aŭstrio, tekstanta en germana lingvo:

« Wer mich entführt,
den Krieg verliert;
zweimal ausprobiert. »

Esperantlingva traduko:
« Kiu forprenas min,
militos al ruin';
dufoje montris sin.

W. M.

DAŬRIGO DE « NOKTO DE P. SIMFORIANO »

Eltirataj el la litaĉfakoj ili ne faris kontraŭstaron. Tio ne havis ja sencon. Ĝi plilongigadis nur la turmenton de agonio.

Mi ne pensis pri tio, kiu el ni mortos la unua. Jam delonge minacis al ni Henjo « La Hotelisto », kiu neŝatis inteligentulojn. Li ne toleris min, same kiel Jurk'on kaj Staszko'n Grudzinski, kiun li kulpigadis pri tio, ke li estis iuĝisto. Nun li vagis inter la ekzekutistoj, timigita, plaĉema, triviala, servema kaj minaca. Li kondukis al ni « La Mongolon », kiu — mi memoras lian koncentriĝintan vizaĝon, ruzajn, sagacajn okulojn — ekstaris apude kaj demandis preskaŭ ĝentile:

— Oficiroj? Komunistoj? Pastroj? Judoj? Konfesu! Eliru!

Neniu el inter ni ekmoviĝis. Tiam « La Mongolo » montris per la fingro

kolegon el la najbara fako. La montrito estis iu tajloro el urbo Kielce. — « Jevrej? » — Judo? — demandis lin la ĉefmurdisto de « mordkommando ». Tiu ekkomprenis kio lin atendas. Li ekpalpebrumis per plenigitaj de sango okuloj. Li ekbalbutis en la lingvo, kiu ŝajnige pretendis esti la rusa. Eltirita sur la mezon de la bloko, li kliniĝis al la piedoj de ekzekutisto. La grupo de hitleranoj, malgraŭ la timo pro pedikoj, kiuj sur niaj manteloj estis multaj, alproksimiĝis, ne dezirante (al si) perdi la spektaklon.

« La Mongolo » malrapide kaptis je la gorgo la kolegon el Kielce, koncentriĝinta, li aŭskultis atende senkonscian balbuton pri edzino, pri infanoj, pri Dio. Mi rigardis sur tion, kiel la fingroj de grandegulo kunpremiĝadis sur la gorgo de la kolego. Kiel liaj okuloj eliradis el la orbitoj kaj la korpo konvulsiis per la lastaj kuntiriĝoj.

La esesmanoj aplaudis. La resto de murdistoj impulsita de « sukceso », falegis sur nin en senkonscia braveco. La bastonoj laboris kun duobligita rapideco kaj forto. La bloko hurlis, ĝemis tiel kiel tion faris la bloko de sovetaj militkaptitoj dum multaj noktoj. Mi ekkomprenis, ke venas mia lasta tago. Mi estis pri tio certa des pli, ke al nia dormfako denove alproksimiĝadis « La Mongolo ». Tiam ĝuste antaŭ « La Mongolo » ekstaris Patro Simforiano kaj levis la manon. Ĝi ne estis la movo simila al tiuj, kiuj forprenadis nian vivon. La pastro Ducki benis « La Mongolon ». La grandegulo malfermigis la okulojn, retiriĝadis. La murdisto kanajlaro amasiĝis en timigitan gregon. Drinkita blokisto palpebrumis per sangversitaj okuloj. Verŝajne li nenion komprenis el tio, kio okazadis. La esesmanoj eltiradis el pistolujo la pistolon.

— Batu! — ekkriis mia blockälteste, sed neniu ekmoviĝis. Neniu Ducki'on frapis. Mohl staris ŝajne trankvila kaj rigardis mian blokiston ludante per pistolo. Tiam la blokisto frapis.

Simforiano falis sur la genuojn. Li leviĝis kaj denove surgenuiĝis. Jam genuante, li plu benis. Al ni pereantoj kaj al la homoj murdantaj nin, eble kun penso pri mizerikordo de Dio, pri kies kompatemo li konvinkadis siajn kunulojn de malbonsorto en ardaĵ disputoj.

— Kion li diris? — demandis raŭkvoĉe hauptscharführer Mahl, rigardante la kapon de la kuŝanto. El la kapo de pastro fluis la cerbo. Kune kun sango.

Neniu el ni respondis. Ni ne povis respondi. Tiam la hauptscharführer ekkriegis: « Raus! » kaj la murdistoj falegis al la pordo en senorda eskapo. Mi ne scias, antaŭ kiu. Ĉu antaŭ la revolvero de la esesmano Mohl, ĉu antaŭ la kadavro baranta al ili la vojon al savita el masakro parto de loĝantoj de la « kvaroj ».

Militkaptitoj forprenis de ni la korpon de la pastro Simforiano. Ĝi estis vestita per soveta unuformo, donacita fare de soldatoj el Volga-regiono. Neniu de li tiun uniformon forprenis.

Smykalski